

John Ellerton,  
Ni estis ja en mano Dia

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1. Ni estis ja en mano Dia,  
dum brilis super ni la Sun'.  
Protektu nin per mano Via  
dumnokte, Dio, ankaŭ nun!

2. La ter' cirkulas ĝis la veno  
de l' nova tag', ripozas ni  
dum tiu nokt' en Via beno<sup>2</sup>  
ĝis la mateno, kara Di'.

3. Nun kiam en malhel' fordronas  
la Sun' en tiu ĉi vesper',  
multvoĉe Via laŭdo sonas  
alialoke sur la Ter'.

4. Ĉar kiel estas ĉirkaŭanta  
la Teron lumo de l' maten',  
senĉese estas plusonanta  
preĝado de la homoj jen.

5. Ja estas, Dio ĉiopova,  
senlima Via regno, nin  
konduku al la tago nova  
en Via regno je la fin'!

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-01-10.*

*Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)*

John Ellerton,  
Du lässt den Tag, o Gott, nun en-  
den

*tradukita de Raymund Weber*

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 - †1893-06-15) en la Germanan de Raymund Weber.*

*Arg-130-256 (2008-11-08 15:30:25)*

*Diese Übertragung ins Deutsche ist abgedruckt in dem Gesangbuch der Katholischen Kirche in Deutschland "Gotteslob", in der neueren Ausgabe. Der Text mit den Musiknoten findet sich auch auf der Heimseite [http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,\\_SS\\_Benedictus\\_XVI,\\_Ves\\_er\\_in\\_der\\_Kathedrale\\_in\\_Muenchen,\\_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).*

---

<sup>2</sup>aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.